GRATIS - SENPAGE

BOLETIM INFORMATIVO DA
ASSOCIAÇÃO PORTUGUESA
DE ESPERANTO

NIA BULTENO

INFORMA BULTENO DE
PORTUGALA ESPERANTO ASOCIO

Rua Dr. João Couto. 6 r/c. A Tel 714 13 59 1500 LISBOA

JULHO - AGOSTO 1987 Nº 33

PIONEIRO DO ESPERANTO EM PORTUGAL

PORTUGALA ESPERANTO - PIONIRO

MANUEL RIBEIRO DA COSTA E ALMEIDA

(Médico - cirurgião)

Por ocasião do Jubileu queremos homenagear o antigo esperantista desde a primeira hora e pioneiro em Portugal. Em 1896 publicou o seu manual de Esperanto "METODO COMPLETO".

Foi membro da comissão linguística internacional.

Costa e Almeida L. K.
REZENDE
(Portugalujo)

------ : ----- : ------

Okaze de Jubileo ni volas omaĝi la malnovan esperantiston ekde la unua horo kaj pioniron de la portugala Esperanto-movado.

En 1896 li eldonis sian manlibron pri Esperanto "METODO COMPLETO" (Kompleta Metodo). Li estis ano de Lingva Komitato.

MAESTRO ERNESTO ESTEVES

O centenário do Esperanto fica assinalado em Portugal, entre outros acontecimentos, pela inauguração do monumento no Barreiro, acompanhada pela banda de música do Barreiro executando o hino "LA ESPERO".

Foi a primeira vez em Portugal que se executou em público o hino do Esperanto.

Há uns meses atrás, quando se pensou em executar o hino, verificou-se que não havia em Portugal a partitura musical do hino. Havia apenas a música escrita para piano e havia uma gravação em "cassete" de um disco contendo o hino executado por uma banda alemã.

Foi então que o samideano Jaime Correia, que é músico clarinetista, teve a iniciativa de pedir ao senhor maestro Ernesto Esteves o trabalho de escrever a partitura do hino "LA ESPERO".

O maestro Ernesto Esteves acedeu gentilmente ao pedido e, a partir da música para piano e da gravação em "cassete", pouco tempo depois ofereceu à Associação Portuguesa de Esperanto o fruto do seu trabalho, isto é, a partitura com o respectivo desdobramento para vinte instrumentos.

Foi essa partitura que serviu para ensaiar a banda do Barreiro que abrilhantou a cerimónia da inauguração do monumento.

A Direcção da Associação Portuguesa de Esperanto aqui renova os seus agradecimentos ao senhor maestro Ernesto Esteves e, com muito gosto, divulga à massa associativa este gesto de benemerência cultural em favor do movimento esperantista.

Franco Simões
12 Maio 1987

TRADUK-KONKURSO

"NIA BULTENO" decidis organizi traduk-konkurson inter siaj legantoj, okaze de la 100-jara Jubileo de Esperanto.

Ni kredas, ke la plimulto de niaj geesperantistoj bonvenigos la eblecon provi kaj pruvi siajn lingvokonojn.

REGULARO:

- Traduku laŭ via elekto ĉapitron el la libro "O Arco de Sant'Ana" de Almeida Garrett.
  La libron vi certe povos trovi en ĉiu biblioteko.
- Viaj tradukoj estu tajpitaj sur formato A4 (1 paĝo = 30 linioj po 60 tajperoj) en 4 ekzempleroj.
- Partopreni povas unuopuloj kaj kolektivoj.
- Ne rajtas partopreni membroj de la estraro kaj ĵurianoj.
- Oni povas partopreni ankaŭ per pluraj tradukoj.
- La redakcio rajtas publikigi viajn tradukojn.
- Oni premios la plej bonajn.
- La konkurso estas anonima, tial subskribu viajn tradukaĵojn per kaŝnomo. Aldonu fermitan koverton sur kiu troviĝu la kaŝnomo. Enmetita en la koverto estu viaj ĝusta nomo kaj adreso.
- Sendu ĉion al:

  Portugala Esperanto-Asocio
  Traduk-konkurso
  Rua Dr. João Couto, 6, r/c A
  1500 LISBOA.

- Findato por akcepto: la 31-an de oktobro 1987.

A N G U L O D E K O L E K T A N T O J

Hodiaŭ oni komencas novan sekcion en nia bulteno dediĉitan speciale al kolektantoj.En ĉiu el ni estas konstanta ena volo kaj instinkta deziro grupigi aŭ kolekti ion ajn. Tion oni sentas.

Oni opinias, ke kolekti estas praula afero,de kiam niaj prauloj vivis kaverne kaj estis devigitaj rikolti manĝaĵojn kaj "kapti" vestaĵojn por vivi...

Do, ĉi tiu angulo enhavos diversajn sciigojn pri filatelaĵoj, numismatikaĵoj kaj aliaj kolektaĵoj utilaj tiel por komencantoj kiel por spertaj kolektantoj(ni kredas!).

Oni akceptas sugestojn kaj estas malfermitaj al via kunlaboro.

Oni esperu ke tiu angulo distrigu vin kaj pli bonigu viajn konojn pri kelkaj formoj de kolektado, precipe el tiuj, kiuj aktuale ekzistas pli disvastigitaj. G.P.

----------oooo0000oooo----------

PRI FILATELO - Kelkaj novaĵoj

- Kubo eldonis specialan poŝtmarkon, ŝtampilon kaj unuatagan koverton je 16-a de Marto, omaĝe al 100-jara jubileo de Esperanto.
- Ankaŭ Surinamo, azia lando, emisiis tri p.m. kun unuatagan koverton kaj poŝtstampon je la 4-a de Februaro.
- Bulgario eldonis sian jubilean p.m. de Esperanto (bildo).

SUFIKSO -EC- KAJ ADJEKTIVAJ RADIKOJ

Lastatempe estas rimarkebla la tendenco eviti la sufikson -ec-, ekz. en la esprimoj "la malfacilo de la tasko, la utilo de la rusa lingvo, la gravo de Virgilio, fiero de la homoj" ktp, trovitaj en nia gazetaro.

Tiuj formoj estas malĝustaj. En bona kaj korekta Esperanto devas esti: la malfacileco de la tasko, la utileco de la rusa lingvo, la graveco de Virgilio, fiereco de la homoj.

La sufikso -ec- estas uzebla kun ĉiuj adjektivaj radikoj, kaj la derivaĵo indikas la nomon de la kvalito aŭ stato, kiun esprimas la radiko: boneco, nobleco, honesteco, libereco, proksimeco, dolĉeco, neŭtraleco, populareco, perfekteco, ĝusteco, ktp. (Komparu amikeco, homeco, nacieco).

Krom tio oni povas certajn (ne ĉiujn!) adjektivajn radikojn substantivigi ankaŭ per simpla almeto de -o, kiam la senco tion postulas, t.e. kiam oni bezonas esprimi ion konkretan: feliĉo, utilo, forto, sano, varmo, profundo, kuraĝo, saĝo, ktp. Inter, ekzemple, utilo kaj utileco, forto kaj forteco, kuraĝo kaj kuraĝeco estas granda diferenco, kaj oni ne povas uzi ilin arbitre. Kelkaj ekzemploj: Ni havas de Esperanto multe da utilo. La utileco de Esperanto estas nekontestebla. Li ne havis forton por lsvi la ŝtonon. La patro provis la forteco de la glacio. Tuberkulozo estas infekta malsano. Pro malsaneco li ne povis partopreni la kunvenon. Ŝi ne havis sufiĉe da kuraĝo por diri la veron. La kuraĝeco de la entrepreno promesas bonajn rezultojn. Ne ĉiam per aĝo mezuriĝas la saĝo. La saĝeco de la knabo mirigis ĉiujn. En la profundo de la maro, de la scenejo, de la ĉambro. La profundeco de la lago Bajkal superas 1600 metrojn. Li falis kaj etendiĝis laŭ sia tuta longo. La longeco de la vojaĝo timigis nin. Zamenhof laboris

por la bono de la homaro. La vero, belo kaj bono regu en la mondo.

Kurbo = kurba linio; rekto = rekta linio. Ruĝo, blanko, nigro, verdo, flavo, bluo estas la nomoj de la respektivaj koloroj. Dolora ruĝo aperis sur ŝia vizaĝo. La verdo estas koloro de la espero La flavo de la ovo. Nigro sur blanko.

Henrik Seppik (el "Esperanto" n-ro 902)

----------oooo0000oooo----------

SAIBA QUE ...

- A Rádio Pequim (China), que este ano festeja o seu 22º ano das suas emissões em Esperanto, convida os seus ouvintes a enviarem-lhe trabalhos sobre o tema "EU E A RADIO PEQUM", em prosa, poesia, pintura, fotografia, etc., contando as suas impressões e vontades. Escreva para Radio Beijin, Esperanto-Fako / Beijing / Cinio (Rep.Pop. da China).

+++000+++

- A Fundação Mundial Contra a Fome (MONDA FONDUSO KONTRAŬ LA MALSATO), fundada em 1982, luta a nivel mundial contra afome e adoptou o Esperanto como língua oficial e publica o boletim "Monda Solidareco" (Solidariedade Mundial). A assinatura custa 12 francos por ano. LES NIDS / F 49190 SAINT AUBIN DE LULGNE FRANÇA.

+++000+++

- O MUSEU INTERNACIONAL DE ESPERANTO, que se encontra instalado no Museu Nacional de Viena (Austria), está este ano a festejar o 60º aniversário da sua fundação.

+++000+++

PARLAMENTA APOGOGRUPO AL ESPERANTO EN PORTUGALIO

Kelkaj landoj jam havas parlamentanojn, kiuj publike simpatias kaj apogas Esperanton, kiel internacian laborlingvon.

Estas notinde, ke en Britio ekzistas jam de longa tempo la Parlamenta Esperanto-Grupo, kiu kreskis ĝis grava nombro de 204 parlamentanoj,kies aktivado estas tre rimarkebla.

Ni sciis, ke en Svedio ekstaras ĵusa apogogrupo de parlamentanoj kaj Sveda Parlamento ĵus eldonis libron pri si en diversaj lingvoj kaj ankaŭ en Esperanto.

Kiuj, el niaj portugalaj samideanoj, kapablas prilabori niajn parlamentanojn?

Ĉu iuj portugalaj parlamentanoj estos esperantistoj? Aŭ eble ili jam estos simpatiantoj?

Certe ni kaj la Estraro de nia Asocio apogos ĉi tiun iniciaton kaj kontribuos ĉu faciligi, ĉu ebligi la agon.

Urĝe vi kontaktu nin, eĉ telefone aŭ skribe.

Kiu volas helpi? La balotado alproksimiĝas!

Kimtonio

----------oooo0000oooo----------

PETO PRI INFORMADO AL NIAJ KARAJ SAMIDEANOJ

Karaj Samideanoj: Ĉe nia Asocio la samideano Gonçalves Pires estas komisiita de Estraro por informado de Esperanto en portugala gazetaro.
Por pli bona dissendado de noticoj kaj artikoloj al gazetoj de nia Lando, bonvolu sendi al ni,elton daĵojn de noticoj publikigitaj en portugalaj perio daĵoj. Ni estas interesataj ankaŭ pri ajnaj referencoj al Esperanto en portugalaj radioj kaj televido. Ni tre dankas. Skribu al APE/Gazetara Servo.

No dia 9 de Maio realizou-se na Escola Secundária de Santo André, no Barreiro, um colóquio sobre o Esperanto, orientado pelo presidente da Associação, no qual participaram os alunos de várias turmas daquele estabelecimento de ensino, além dos respectivos professores.

----------oooo0000oooo----------

No dia 30 de Maio iniciou-se, na Biblioteca Municipal do Barreiro, um curso de Esperanto, com a participação de cerca de 25 alunos do ensino secundário e universitário, além de alguns licenciados, ministrado pelo Dr. Correia Coimbra.

----------oooo0000oooo----------

A Junta de Freguesia de Agualva-Cacem aprovou por unanimidade a proposta de ser dado o nome de "ESPERANTO, Língua Internacional" à praceta vizinha de outra denominada "Fraternidade Universal".

O pedido seguiu para a Camara Municipal de Sintra, que decerto aprovará.

----------oooo0000oooo----------

Na Faculdade de Ciências da Universidade de Lisboa está a funcionar um curso elementar de Esperanto, para alunos daquela Faculdade, com a duração de duas horas semanais.

De notar, que o mesmo se realiza, a pedido dos próprios estudantes, que para o efeito contactaram o presidente da nossa Associação, Dr. Correia Coimbra, que o ministra.

Parabéns ao nosso dinamico presidente.

BIMESTRAL

Director: **D. OLGA SERRA MARQUES DE ALMEIDA**

Redactor: **ANTÓNIO DA SILVA ALMEIDA**

Propriedade de: ASSOCIAÇÃO PORTUGUESA DE ESPERANTO

Redacção e Administração: Rua Dr. João Couto, 6, r/c-A — 1500 LISBOA

Composição e Impressão: Rua Dr. João Couto, 6, r/c-A — 1500 LISBOA